

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 08. Februaro 5, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

BET ĉi-jare en Latvio – interesa!

De la 15-a ĝis la 22-a de julio 2023 en la havenurbo Ventspils en Latvio okazos la 57-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-57). Baltiaj Esperanto-Tagoj laŭvice okazantaj en Latvio, Estonio kaj Litovio jam ekde 1959 estas la plej signifa Esperanto-aranĝo de tiu regiono kaj jam delonge ĝin partoprenas ne nur esperantistoj el la tri Baltiaj ŝtatoj kaj apudaj landoj, sed el multaj aliaj Eŭropaj landoj kaj eĉ el aliaj kontinentoj.



Ĉi-jare estas vico de Latvio kaj Latvia Esperanto-Asocio elektis Ventspils kiel urbon de BET-57. Ĝi estas unu el la plej prosperaj urboj de Latvio, populara turisma centro kaj ripozloko ĉe la balta maro. Ventspils estas la sesa plej granda urbo de Latvio (pli ol 37 mil loĝantoj), situas 188 kilometrojn for de la ĉefurbo Rigo en la nord-okcidenta parto de Latvio. BET-57 funkcios en ejoj de la Teknika Lernejo de Ventspils,

partoprenantoj loĝos en la Studenta hotelo de lernejo. La programo de BET enhavos diversnivelajn Esperanto-kursojn, enkondukan kurson en la latvan lingvon, Someran Universitaton, espereble AMO-seminaron kiu jam estas akceptita, vastan kulturalan programon, ekskursojn, kvizojn, kantojn, dancojn kaj aliajn aranĝojn.

Pli detalan informon kaj retan aliĝilon trovu en la hejmpaĝo de Latvia Esperanto-Asocio www.esperanto.lv. Bonvenon al BET-57, bonvenon al Latvio!

Margarita Zelve

Ni aperigos en EKO pliajn fotojn pri la urbo kaj la kongresejo.

Kroata kongreso fine de junio

<https://novo.dec-kroatio.hr/eo/>



UN bulteno 60 pri rezultoj el Montrealo kaj plue

Legu pri tio en la alkroĉaĵo. Plie ĝi informas pri progresoj en Duolingo kaj multlingveco en Unuiĝintaj Nacioj laŭ ĝia Asembleo.

Babilmanĝo en la Lomea universitato

Komenciĝos la renkontiĝo Babilmanĝo en la universitata kampuso de Lomeo, pro aranĝo de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO) kaj Esperanto-Plus, faka asocio de UEA. La kunveno disvolviĝos ĉeeste laŭ la ĉi-sekva provizora programo: a) Alveno kaj instalado de la partoprenantoj, b) Bonvenigo, c) Sinprezento de partoprenantoj, ĉ) Mallonga prezento pri Esperanto, d) Prelego kaj diskutoj pri la temo «Afrikeco: fiera esti afrikano», e) Kunmanĝo, f) Intervjuo kun ĵurnalistoj pri Esperanto kaj Diversaĵoj. Estas atendata partopreno de dudeko da esperantistoj kaj geamikoj de Esperanto de la ĉefurbo Lomeo kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

Adjévi Adjévi

La sekreto de la Barcelona UK en 1909

Jen la lasta ero el ESF

Pilar Requejo de Lamo: [La Universala Kongreso de Esperanto, kiu preskaŭ ne okazis: Barcelono, 1909](https://esfconnected.org/2023/01/23/kongreso-barcelono-1909/)

<https://esfconnected.org/2023/01/23/kongreso-barcelono-1909/>

IKU kaj la Scienca Kunveno denove en 2023

Kadre de la 108-a UK en Torino okazos la 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la 31-an de januaro 2023. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Tiukaze bonvolu indiki, ĉu la IKU-propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso. Kiel en Montrealo, ankaŭ en Torino la IKU-prelegoj povas esti virtualaj, nome eblos prelegi per Zoom.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto - sume ne pli ol unu paĝon. Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la Scienca Kafejo (SK). Kiel pasintjare, proponojn nur por SK eblas sendi ankaŭ post la limdato, ĝis 28.2.2023.

Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Por IKU-AIS-kurso la honorario estas 300 EUR kaj por SK - 120 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono - de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.

En 2023 denove estos aljuĝita la Premio Pirlot (PP) por la plej bonaj sciencaj verkoj de la jaro. La [regularo](#) troviĝas ĉe

ais-sanmarino.org/regular/2016/Regularo%20Premio%20Pirlot%20rev2016.pdf.

Proponoj bonvenas ĝis 31.5.2023 ĉe la PP-sekretario renato@esperanto.org. La Premio Pirlot estas aljuĝata en tri branĉoj: libro, artikolo kaj prelego, aperintaj en la lastaj 5 jaroj. La sumo de la premioj en ĉiuj branĉoj estos minimume 400 EUR. Proklamo de la gajnintoj okazos dum la UK en Torino.

La 39-a sesio de la Scienca Universitata Sesio (SUS) de AIS okazos kadre de la [100-a Germana Kongreso](#) en Braunschweig, fine de majo. Proponoj de SUS-prelegoj aŭ kursoj bonvenas ĉe la SUS-kunordiganto amri@huji.ac.il ĝis 31.3.2023. Eblas ankaŭ prelegi defore. La publikigo de SUS-kontribuo estos subtenata per 100 EUR por kurso kaj 50 EUR por prelego, depende de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-SUS-libro. Deforaj prezentaĵoj ricevos duonon de tiuj sumoj.

<https://www.youtube.com/watch?v=xI7lq9I3Lkg>

Mirejo donas al ni abundan kaj detalan prezentadon de la Konferenco de ILEI en Porto Novo, politika ĉefurbo de Benino, en julio 2008. Estas interesa dokumento pri la vivo de ILEI. Origina kunligo en la kanalo de Mirejo:

<https://www.youtube.com/watch?v=oLopA...>

La filo firme agas filme

Mi dividas kun vi la filmeton, kiun mia filo, Marteno faris kadre de sia alia laboro ĉe la kanalo Easy languages (speciale *Easy Dutch* kaj *Easy Russian*). Mi fieras ke li sukcesis konvinki la teamon fari ion pri Esperanto. Ŝatoj, kuraĝigoj sub la YouTube-

filmo (ne nur en Esperanto) eble helpos en tio, ke oni decidu pri eblo daŭrigi la serion pri Esperanto. Gratulojn, Marteno!!! Mi fieras pri vi.

<https://www.youtube.com/watch?v=LgFoSJ4Z6pw>

Katalin Kovacs

Kunikloj festataj, komunikita al ni de ILEI



<https://esperanto.cri.cn/2023/01/31/ARTIz3IzYlvCwEt3xOVvnEkR230131.shtml?spm=C78862.Ph5HEAhyLcMg.S95520.2>

Por celebri la jaron de la kuniklo laŭ la ĉina kalendaro, ni povas nun prezenti la ĉarmajn bestetojn en du pentraĵoj de Ticiano (Tiziano Vecellio, 1485-1568), unu el la plej elstaraj majstroj de la itala Renesanco, fama pro la maniero, en kiu liaj olekoloraj tuŝoj delikate vivigas la karnon de virinoj, infanoj kaj bestoj.

===== vortoj: 950 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolisto.